# ESPERANTISTO.

Gazeto de la lingvo internacia „Esperanto".

Zeitschrift für die internation. Sprache „Esperanto". | Gazette de la langue internationale „Esperanto".

Eldonata unu fojon en la monato de **L. Zamenhof** kaj **W. H. Trompeter** sub la redakcio de **L. Zamenhof.**

Kosto por jaro (kune kun poŝta transsendo) 2 frankoj (= 1 marko 60 pfenigoj = 80 kopekoj). Kiu alsendas la pagon por 10 ekzempleroj, ricevas 1 ekzempleron senpage. Anoncoj po 5 centimoj por duonpaĝa milimetro alteco da spaco.

Kun ĉio tuŝanta la administracion de «Esperantisto» (abonoj, anoncoj, ŝanĝo de la adresoj, plendo pri nericevado de numeroj k. t. p.) oni volu sin turni al **W. H. Trompeter** à **Schalke**, Westfalie, Allemagne.

Kun ĉio tuŝanta la redakcion de «Esperantisto» (korespondoj, artikoloj, sciigoj, demandoj k. t. p.) oni volu sin turni al **Dr. L. Zamenhof** à **Varsovie**, Russie. (Li akceptas ankaŭ abonojn.)

Oni povas aboni ankaŭ en la librejo de **Heerdegen-Barbeck** en **Nurnbergo.**

**No. 6.** **Nurnbergo,** Junio 1892. **Jaro III.**

## Nia afero.

Unu glora militisto diris, ke por milito estas necesaj tri objektoj: mono, mono kaj mono. Ankaŭ pri nia afero ni povas diri, ke ĝi bezonas nur tiujn ĉi tri objektojn. Mono estas la punkto de apogo, dank' al kiu ni povus levi la tutan mondon. Donu al ni sufiĉe da kapitalo, kaj morgaŭ la tuta mondo parolos unu lingvon, kaj la muroj inter la popoloj apartenos al la legendoj de la estintaĵo. Nenio mankas al ni ekster mono, sed ankaŭ nenion ni faros sen mono!

Ni ricevas amason da konsiloj kaj postuloj; oni montras al ni, kion ni devas fari, sed oni ne montras al ni, kie preni la rimedojn. «Kreu grandan literaturon kaj imponu al la mondo per faktoj; plenigu la mondon per lernolibroj kaj propagandaj broŝuroj; donu konstantajn anoncojn en ĉiuj gazetoj; sendu al ĉiuj libristoj kelkan nombron da libroj» k. t. p. k. t. p. Tre bele, tre bele, ni povas ĉion tion ĉi fari tre facile kaj tre rapide, sed por ĉio tio ĉi mankas al ni ĉiam unu kaj tiu sama objekto — la mono! Ni devas oferi mem kaj, kio estas la plej grava — ni devas altiri ricevlojn al nia afero. Per unu vorto, ni devas antaŭ ĉio peni trovi kapitalon por nia afero, ĉar kapitalo estos nia plej forta batalilo.

Kiu volas kaj povas oferi por nia afero, al tiu ni konsilas sendi la oferojn al ni aŭ al la nun oficialigita societo «Espero» en S. Peterburgo (sub adreso de la kasisto de la «Espero», s-ro S. V. Terentjev, Kuzneĉni pereulok No. 15, l. 8, S. Peterburgo).

Nia mono estos nia batalilo, kaj estus tre domaĝe, se tiu ĉi mono estus disuzata sen utilo. Tiel anstataŭ ke ĉiu oferanto faru apartajn eksperimentojn, ni konsilas al ĉiu sendi sian monon al unu el la 2 nomitaj lokoj, por ke la kapitalo ne distriĝu, sed estu uzata sisteme.

Estus tre dezirinde, ke ĉiuj rusaj amikoj de nia afero kiel eble plej baldaŭ fariĝu membroj de la societo «Espero» kaj altiradu al ĝi ĉiam novajn membrojn.* Lerni aŭ fari ion volas nur tre malmultaj, sed

simple oferi kelkan sumon da mono kaj enskribiĝi kiel membroj-helpantoj de la «Espero» multaj ne rifuzos. Ankaŭ al la amikoj en aliaj landoj ni konsilas alskribiĝi al ia el la ekzistantaj kluboj.

Ricevante sciigon de aliĝo de novaj esperantistoj, ni en la plej granda parto bedaŭrinde ne scias, kiu ilin altiris. Tial al la amikoj, kiuj disdonas kaj dissendas lernolibrojn de nia lingvo, ni konsilas fari la jenon: sur la blanketo aldonita al ĉiu lernolibro (sciigo pri aliĝo) surskribi (aŭ pli bone stampi aŭ presi) sur la flanko aŭ en ia angulo sian propran nomon. Per tia maniero, ricevante la subskribojn de novaj esperantistoj, nia redakcio scios kaj povos presi apud la nomo de ĉiu esperantisto la nomon de lia altirinto. Tio donos al ni la eblon scii, kiu el niaj amikoj plej multe kaj plej fruktoporte laboras, kaj nia konstanta rubriko «Novaj Esperantistoj» prezentos dank' al tio la plej klaran historion de laborado de ĉiu esperantisto.

La societo «Espero» komencis jam sian oficialan agadon. De la 13-a Majo ĝi havas jam sian propran loĝejon (Kuzneĉni pereulok, d. No. 15), konsistantan el 2 grandaj ĉambroj. La regularo (en lingvoj rusa kaj esperanto) baldaŭ estos presita. La 15-an de Majo estis la unua oficiala komuna kunveno, al kiu multaj personoj ricevis inviton. La programo de la kunveno estis: komuna preĝo; elekto de prezidanto de la kunveno; legO de la regularo; elekto de prezidanto kaj membroj de la Komitato; difino de la grandeco de membra pago; akcepto de kandidatoj por membroj de la societo.

Sinjoro S. Lundström skribas al ni, ke la svedaj kluboj esperantistaj laŭ lia propono deziras nun ligiĝi kaj fondi komunan svedan societon esperantistan por la tuta lando; la nun ekzistantaj svedaj kluboj fariĝus en tia okazo lokaj filioj de la komuna societo.

Sinjoro José Rodriguez Huertas komencis preparadi poŝan lernolibron de nia lingvo por hispanoj (analogie je N-ro 41). Post kolektiĝo de mono la verko estos eldonita laŭ la kondiĉoj, pri kiuj ni parolis en N-ro 1.

En la lasta tempo la sekvantaj gazetoj parolis pri nia afero: «Ekaterinburgskaja Nedela» No. ? (traduko de la Fingra Kalendaro el la «Esperantisto») [V. Ŝmurlo]; «Kurjer Codzienny» No. 112 (pri la oficialigo de la «Espero»); «Denj» No. 1383 (anonco de s-ro Martakov) [A. Martakov]; «Sin Oteĉestva» II No. 98 (oficialigo de la «Espero») [A. Grünfeld]; «Russkaja Ĵiznj» No. 95 (oficialigo de la «Espero») [A. Florell]; «Russkaja Ĵiznj» No. 98 (pri la laboroj de «Espero», pri la himno de Adelsköld) [A. Florell]; «Novorossijski Telegraf» No. 5391 (granda artikolo de profesoro Ŝerel pri nia lingvo) [M. Solovjev]; «Upsala» No. 53 (pri nia lingvo kaj la svedaj kluboj) [S. Lundström]; «S. Petersburger Zeitung» No. 121 (pri la unua kunveno de la «Espero» kaj laboroj de la societo) [A. Florell]; «Russkaja Ĵiznj» No. 116 (pri la unua kunveno de la «Espero») [A. Florell]; «Svjet» Nr. 87—96 (anoncoj de Zamenhof). Ekster tio sinjoro Evstifejev skribas al ni, ke li legis artikolojn pri nia lingvo en la sekvantaj gazetoj: «Russkija Vjedomosti» No. ? (pri la

societo «Espero»), «Russkaja Misl» 1891 No. 2, «Sjeverni Vjestnik» 1891 No. 6, «Kraj» 1891 No. ?, «Kraj» 1891 No. 47, «Glos» 1891 No. 1, «Glos» 1891 No. 17, «Revue Scientifique» 1891 No. ? (artikolo de S. Richet: «Cent ans après»), «Don» 1891 No. 119, «Revue Scientifique» 1892 No. 4 (?).

---

La sekvantaj novaj personoj deziras korespondadi en Esperanto: N. Evstifejev, A. Taubes, A. Grünfeld, A. Bloch; (iliajn adresojn oni trovas en la Adresaro) ankaŭ fraŭlino Lydia Tidestrand. Arbrå, Svedujo.

---

# Frenezulino.

La juna, bela, vizaĝ' anĝela,
Senkulpa, k'el infano,
Ĉe la patrino ŝi, sol-filino,
La helpa dekstra mano.
Sen zorgo ia la vivo ŝia
Fluadas sen doloro.
Sed venis amo, la kora flamo —
Ekfrapis ŝia koro.
Sinjoro riĉa al la feliĉa,
Senzorga kaj nesperta
Sopire ĝemas, la belan premas
Li, deloganto lerta.
De la riĉulo kun larmokulo
Avertas ŝin patrino;
Ne helpas varmaj admonoj larmaj —
Jam amas la filino.
— Filino mia! fals-amo lia
Por vi — nur malhonoro! . . .
— Vi vane timas — li min estimas,
Kaj amas lia koro.
— Sed amo lia nur papilia:
Elsuĉos koron vian —
Monato pasos, li vin forlasos
Por ami duan . . . trian . . .
— Ne, ne, patrino! — al ŝi filino
Obstine kaj plorante —
Vi vane timas, li min estimas —
Ripetas nur konstante.
— Ne per admono, sed per bastono
Mi vin ekprudentigos!
Mi la belulon abomenulon
El via kap' forigos! . . .
Ne enviinda kaj ne aminda
Ho, estos lia sorto! . . .
Diabloj prenos lin, kiam venos
Li nun al nia korto! —
Filino staris, kun ŝultroj faris,
Respondon ŝi ne donis,
Sed en l'oreloj satan-kapeloj
Patrinaj vortoj sonis . . .

* * *

En la ĝardeno kun lun'-elveno
Sur alton la ĉielan
Sur la lageto en la ŝipeto
Ni vidas paron belan.
— Ho, kara mia! ĉu amo via
Por mi la malhonoro?
Ho, diru veron kaj la esperon
Redonu al la koro!
Kaj kial do vi, al si por trovi . . .
Amantan . . . la edzinon,
Ne el graudmondo — el vilaĝrondo
Preferis la knabinon?
En mond' ja via knabino ĉia
Pli bela estas, riĉa? . . .
Ĉu mi, sovaĝa infan' vilaĝa,
Mi estas plej feliĉa? . . .
— Mi . . . mia koro . . ., maljusta moro . . .
Mi . . . mi vin sole amas!
Kaj la fidela por vi nur, bela,
Kor' mia tremas, flamas! . . .
— K'al do detenas, k'al do malbenas
Konstante min patrino?
— Vi ne aŭskultu, kaj ŝi insultu,
Freneza la virino!
— Ho, timu Dion, ne diru tion,
Amata, kara mia! . . .
Tsss . . . en arbeto jen ŝanceleto . . .
Ŝteliĝas fremda ia? . . .
— Ne, vent' ekblovis, foliojn movis,
Vi vane timas, tremas.
Kaj la tremantan li ŝin febrantan
Al sia brusto premas . . . — — —
— Ha, malnoblulo! ha, vi krimulo! . . .
Malben' al la filino! . . .
Kvazaŭ pantero ŝi en kolero
Jam naĝas, la patrino . . .
Ŝi dronos eble, neeviteble,
Freneza en kuraĝo?
Sed la patrino, «frenezulino»
Ne dronas, malgraŭ l'aĝo . . .
— Ŝi min malbenos, kiam mi venos
Al la patrina korto!
Ne rekonatan, malestimatan
Min pelos for sen vorto! —
Ekblovis vento de oriento,
Alportis malvarmeton . . .
Kaj la patrino, «frenezulino»,
Renversis la ŝipeton — —

* * *

Nun la patrino — frenezulino
En frenezejo sidas,
Kaj kun sovaĝo en la vizaĝo
Jen ploras ŝi, jen ridas,
Okulojn metas kaj fulmojn ĵetas —
Kor-sangiganta homo! . . .
Sin turmentadas kaj bataladas
Kun de la mort' fantomo.

— Vilaĝdometon kaj ĝardeneton
Mi havis antaŭ jaroj . . .
Kaj filineton belulineton —
Enviis min najbaroj . . .
Korpeto neĝa, teniĝo reĝa . . .
De ĉielruĝ' infano . . .
Ha! malnoblulo! . . . ha, vi, krimulo!
Infera vi satano! . . .

En la ĝardeno lageto plena . . .
Ho, neenterigita! . . .
Mi ŝin mortigis, mi ŝin dronigis . . .
Patrin' frenezigita! . . .
Mi? — —
Ha! satano — for de l'infano!! . . .
Ha, ha! . . . «frenezulino»!? . . .
— — — — — — —

Ŝi ekkriegis — sang' elŝprucegis
Kaj — mortis la patrino . . .

Fez.

# La juĝo de Zeŭs.

(Fino.)

La aero forportis tuj la ambaŭ diojn de la Pnikso kaj post momento ili sin trovis ambaŭ super unu el la domoj proksime de la Stoa. La Argon-detruinto levis per la potenca manplato la tutan supron de l'domo, egale facile, kiel mastrino, kuiranta manĝaĵon, levas la kovrilon de poto, kaj, montrante virinon, sidantan en butiko, fermita de la strato per kupra krado kaj lana kurteno, li diris:

— Rigardu!

Apollo ekrigardis kaj ŝtoniĝis.

Neniam Attika, neniam la tuta tero greka produktis pli belan floron ol tiu ĉi virino. Ĉe l'brilo de triobla lampo, ŝi sidis klinita super la tablo kaj notadis ion diligente sur marmoraj tabuletoj. Ŝiaj longe mallevitaj haroj de palpebroj ĵetadis ombron sur la vangojn, sed en momentoj ŝi levadis la kapon kaj la okulojn supren, kvazaŭ pripensante kaj rememorigante al si, kion ankoraŭ ŝi devas enskribi, kaj tiam estis videblaj ŝiaj miregindaj steloj okulaj, tiel bluaj, ke apud ili la turkisa dronaĵo de l'Arhipelago ŝajnis pala kaj kolorperdinta. Tio estis ĝuste la vizaĝo de Kiprida, blanka kiel la mara ŝaŭmo, rozigita, kiel la stelo matena, kun buŝo kiel Syria purpuro, kaj kun ora ondaĵo de haroj — bela, la plej bela sur la tero — bela kiel floro, kiel lumo, kiel kanto!

Kiam ŝi mallevadis la okulojn, ŝi ŝajnis trankvila kaj dolĉa, kiam ŝi ilin levadis enpensiĝe — inspirita. Sub la Radiulo komencis tremi la diaj tibioj; subite li apogis la kapon sur la ŝultron de Hermes kaj ekmurmuretis:

— Hermes, kiel mi ŝin amas! Tiu ĉi aŭ neniu!

Hermes ekridetis ruze kaj estus ekfrotinta el ĝojo la manojn sub la faldoj de la ĥleno, se en la dekstra mano li ne tenus la bastonon.

Dume la orharulino prenis novan tabuleton kaj komencis skribi sur ĝi. Malfermiĝis ĉe tio ŝia buŝo dia kaj eksonis ŝia voĉo, simila al la voĉo de belsona formingo:

— . . . Membro de l'Areopago Melanokles por pano en la daŭro de du monatoj: draĥmojn kvardek kvin kaj kvar obolojn . . . ni skribu pro rondeco draĥmojn kvardek ses . . . Pro Atena! ni skribu kvindek — la edzo estos kontenta! Ha, tiu ĉi Melanokles . . . Se vi ne povus ataki nin pro falsa pezo, mi donus al vi krediton . . . Sed kun tiu ĉi akridaro oni devas esti bone . . .

Apollo ne aŭskultis la vortojn, li nur malsobriĝadis per la sono de la voĉo, per la sorĉo de la figuro, kaj murmuretis:

— Tiu ĉi, aŭ neniu!

La orhara parolis, skribante plu:

— Alcibiades, por dolĉaj kukoj sur mielo el Himeto por la hetero Ĥrizalis: minojn tri. Tiu ĉi neniam trarigardas la kalkulojn, ekster tio li ekfrapis min unu fojon en la Stoa sur la skapolon . . . ni skribu pro tio: minojn kvar. Se li estas malsaĝa, li pagu . . . Sed ankaŭ tiu ĉi Ĥrizalis! . . . Aŭ ŝi nutras per mielkukoj siajn karpojn en la lageto aŭ eble Alcibiades intence ŝin grasigas, por vendi ŝin poste al komercistoj Fenikaj por radetoj el osto elefanta al la ĉevala armaĵo.

Apollo ne atentis je la vortoj, li malsobriĝadis nur per la voĉo kaj murmuretis al Hermes:

— Tiu ĉi aŭ neniu.

Sed la filo de Maja kovris subite la domon kaj la mireginda apero perdiĝis, kaj al la Radiulo ŝajnis, ke kune kun ĝi malaperas la steloj, nigriĝas la luno kaj la tuta mondo kovriĝas per mallumo de la landoj Kimmeraj.

— Kiam la veto devas decidiĝi? — demandis Hermes.

— Hodiaŭ, tuj!

— Ŝi dum la neestado de l'edzo dormadas en la butiko. Vi povas ekstari tie sur la strato, antaŭ tiu ĉi krado. Se ŝi formovos la kurtenon kaj malfermos al vi la kradon, mi perdis la veton.

— Vi perdis! — ekkriis la Malproksime-trafanto.

Kaj ne tiel rapide somera fulmo transkuras nokte inter la oriento kaj okcidento, kiel li ekflugis super la salaj ondoj de l'Arĥipelago. Tie elpetinte de Afrodita malplenan ŝelon de testudo, li ligis sur ĝi sunajn radiojn kaj kun preta formingo revenis Atenojn.

En la urbo estis jam tute trankvile, la lumoj estingiĝis, nur la domoj kaj sanktejoj blankiĝadis en la brilo de la luno, kiu alte elnaĝis sur la ĉielon.

La butiko kuŝis en rompaĵo de muroj, kaj en ĝi, post krado kaj kurteno, dormis la belega Erifila. La Radiulo, ekstarinte sur la strato, komencis bati la kordojn de la formingo. Dezirante veki facile sian amatinon, li ekludis komence tiel mallaŭte, kiel mallaŭte en vespero printempa sonas la aroj da kuloj super la Illiso. Sed la kanto ŝveladis grade, kvazaŭ monta rivero post dia pluvo, kaj ĉiam pli potenca, dolĉa, pli malsobriganta, plenigis la tutan aeron, kiu komencis tremi volupte. La mistera birdo de Atene alflugis per mallaŭta flugo de l'flanko de l'Akropolo kaj sidiĝis nemova sur proksima kolono.

Tuj nuda brako, inda je Fidias aŭ Praksiteles, pli blanka ol Pentelikaj marmoroj, formovis la kurtenon . . .

En la Radiulo haltis la koro pro tuŝiteco.

Kaj eksonis la voĉo de Erifila:

— Kia azeno treniĝas en la nokto kaj gratas la kordojn! Ne sufiĉe, ke homo en la tago laceladoriĝas, ankoraŭ en la nokto oni ne permesas dormi al li!

— Erifila! Erifila! — vokis la Arĝentarka.

Kaj li komencis kanti:

> El la Parnasaj plej altaj supraĵoj,
> Kie en brilo kaj inter bluaĵoj
> La inspiritaj, nur min adorante,
> Muzoj en kantoj min gloras konstante:
> Mi, dio, mi tin lum' adorata,

Venas! . . . La brakojn malfermu, amata!
Sur via brust' kiel fulmo la brila
Pasus l'eterno al mi, Erifila! . . .
— — — — — — —
— — — — — — —

— Ĉe l'sankta faruno ofera! — ekkriis la edzino de l'bakisto — tiu ĉi fripono kantas al mi kaj min volas delogi; ĉu vi ne iros la domon, turmentulo?!

La Radiulo, volante ŝin konvinki, ke li ne estas ordinara mortemulo, eklumis subite tiel, ke de lia brilo lumiĝis la tero kaj la aero — sed Erifila, vidante tion, ekkriis:

— La sentaŭgulo kaŝis lanterneton sub la ĥleno kaj prezentas sin al mi por ia dio. Ho, filino de l'potenca Zeŭs! per depagoj ili scias nin premi, sed eĉ ne estas gardistaro Scita en la urbo, per preni tiajn malsaĝulojn en la malliberejon.

Apollo ne forlasis la gajnon kaj kantis plue:

Brakojn malfermu kaj venu al koro,
De mi eterna atendas vin gloro . . .
Kaj super ĉiu olimpa diino
Nom' via estos glorata sen fino . . .
Bela! mi donos al vi nemortecon,
Mi tiel vian ornamos belecon
Per la potenco de l'vorto la dia,
Ke en Grekujo reĝino nenia
Estos egale kun vi adorata!
— — — — — — —
Brakojn malfermu, malfermu, amata! . . .
— — — — — — — — —
— — — — — — — — —
Mi de la mar' prenos ĝian lazuron,
De l'ĉielruĝo — la oron, purpuron,
Brilon de l'steloj kaj roson de l'floro;
Kaj tia luma, brilanta teksaĵo
Estos por mia amata de l'koro
La ĉielarka Kiprida vestaĵo . . .

Kaj la voĉo de l'dio de la poezio sonoris tiel belege, ke ĝi elvokis miregindaĵon. Jen en la ambrozia nokto ektremis la ora ponardego en la mano de Atene, staranta sur la Akropolo, kaj la marmora kapo de l'giganta statuo turniĝis iom al la Katapolis, por pli bone aŭskulti la vortojn de l'kanto . . . Aŭskultis la ĉielo kaj la tero; la maro ĉesis bruadi kaj ekkuŝis mallaŭte ĉe la bordoj, eĉ la pala Selene interrompis sian noktan migradon sur la ĉielo kaj ekstaris senmova super Atenoj.

Kaj kiam Apollo finis, eklevis sin facila vento kaj portis la kanton tra la tuta Grekujo; kaj kie ajn ekaŭdis eĉ unu ĝian tonon infano en lulilo, tie el tiu ĉi infano devis elkreski poeto.

Sed pli frue ankoraŭ ol la filo de Latona finis, kolera Erifila komencis kriegi laŭte:

— Malsaĝulo ia! Per roso li tie komercados kaj per steloj. Ĉar la edzo ne estas en la domo, tial vi pensas, ke ĉio estas permesita al vi? He, domaĝo, ke la helpantaron mi ne havas sub la mano; mi instruus vin la prudenton! Sed ankaŭ tiel mi deinstruos vin, fripono, treniĝi nokte kun muzikilo!

Tion dirinte, ŝi ekkaptis la vazon kun acidaĵo fermenta kaj tra la krado superverŝis al la Radiulo la radian vizaĝon, la radian kolon, la radian ĥlenon kaj formingon. Ekĝemis Apollo pro tio kaj, kovrinte sian kapon per duonaĵo de la malseka ĥleno, li foriris en honto kaj kolero.

Hermes, atendanta sur la Pnikso, ekkaptadis siajn koksojn, stariĝadis sur la kapo kaj turnadis el ĝojo la sceptron en la aero.

Sed kiam la ĉagrenita filo de Latona proksimiĝis al li, la ruza protektoro de komercistoj ŝajnigis kompaton kaj diris:

— Malagrable estas al mi, ke vi perdis, ho, Malproksime-trafanto!

— Iru for, ruzulo! — rediris kun kolero Apollo.

— Mi iros, nur vi fordonos al mi Lampecia'n.

— Cerbero al vi disŝiru la tibiojn! Mi ne donos Lampecia'n kaj mi diras, iru for! ĉar mi rompos vian bastonon sur via kapo.

La Argon-detruinto sciis, ke, kiam Apollo estas kolera, li ne konas ŝercojn, tial li retiriĝis singarde kaj diris:

— Se vi min volas trompi, tiam estu de nun Hermes kaj mi fariĝos Apollo. Mi scias, ke vi min superas per la potenco kaj povas malutili al mi, sed per feliĉo estas iu pli forta ol vi, kaj tiu ĉi nin disjuĝos. Mi vin vokas, Radiulo, al la juĝo de l'Kronido! . . . Iru kun mi!

Apollo ektimis je l'nomo de l'Kronido, ne kuraĝis malkonsenti kaj ili ekiris.

Kaj dume komencis tagiĝi. Attika elkliniĝadis el la ombro. La rozofingra stelo matena leviĝis sur la ĉielo el la flanko de l'arĥipelago.

Zeŭs estis pasiginta la nokton sur la supro de l'Ida — kaj ĉu li dormis aŭ ne dormis kaj kion li tie faris, neniu tion sciis, ĉar la Nebulportanto sin enkovris per nebulo tiel densa, ke eĉ Hera nenion tra ĝi povis vidi. Hermes tremis iom, proksimiĝante al la patro de la dioj kaj homoj.

— La pravo estas sur mia flanko — li pensis — sed se okaze Zeŭs vekiĝis kolera, se okaze, antaŭ ol li elaŭskultos, li kaptos ĉiun je la piedo, turnos sur la kapon kaj ĵetos iajn tricent stadmojn atenajn! Ankoraŭ por Apollo li havas ian estimon, sed kun mi, kvankam mi estas lia filo, li ne faros ceremoniojn.

Sed vana estis la timo de l'filo de Maja. La Kronido sidis sur la tero gaja, ĉar la nokto al li pasis gaje kaj en gloro ĝoja li ĉirkaŭkaptadis per lumantaj okuloj la teran rondon. La tero ĝojigita per la rideto de l'patro de la dioj kaj homoj, naskis luman majan herbeton kaj junajn hiacintojn, kaj li, apogante sin sur ĝi per la manplatoj, ludis per la fingroj en la bukla floraro kaj ĝojis en la koro levita.

Vidante tion ĉi, la filo de Maja trankviliĝis kaj, farinte profundan saluton al la naskinto, kuraĝe komencis plendi la Radiulon — kaj ne tiel dense falas la neĝaj flokoj en la tempo de la neĝa blovado, kiel dense faladis la vortoj elokventaj.

Kiam li finis, Zeŭs silentis momenton, kaj poste li diris al Apollo:

— Ĉu ĉio ĉi estas vera, Radiulo?

— Vera, patro Kronido — rediris Apollo — sed se post la honto, kiu min renkontis, vi ankoraŭ ordonos al mi pagi la veton, tiam mi iros malsupren al Hades kaj lumos al la ombroj.

Zeŭs enpensiĝis ree kaj meditadis.

— Sekve tiu virino — li demandis fine — restis surda al via muziko, via kanto, kaj repuŝis vin kun malestimo?

— Ŝi elverŝis al mi vazon da fermenta acidaĵo sur la kapon, ho Tondrordonanto!

Zeŭs kuntiris la brovojn, kaj de tiu ĉi kuntiro ektremis tuj la Ida. Rompaĵoj de rokoj komencis ruliĝi kun krako en la maron kaj la arboj kuŝiĝis kiel spikoj, kiujn tranĉas la vento.

Ektimegis la ambaŭ dioj kaj kun tremantaj koroj ili atendis la juĝon.

— Hermes, — diris Zeŭs — trompu kiom vi volas la homojn, la homoj volas esti trompataj. — Sed la diojn lasu en paco, ĉar, se mi ekflamos per kolero kaj ĵetos vin en la eteron, tiam, defalinte, vi subakviĝos tiel profunde en la dronaĵo de l'oceano, ke eĉ mia frato, Posejdon, ne eltiros vin el tie per la tridento.

Dia timo ekkaptis la glatajn genuojn de Hermes, kaj Zeŭs parolis plue ĉiam per pli potenca voĉo:

— Virino virta, precipe kiam ŝi amas alian, povas kontraŭstari al Apollo . . .

. . . Sed kun certo kaj ĉiam kontraŭstaros al li virino malsaĝa . . .

. . . Erifila estas malsaĝa, ne virta, kaj tial ŝi kontraŭstaris al li . . .

. . . Sekve vi trompis la Radiulon . . . kaj Lampecia'n vi ne havos . . . Kaj nun, iru en paco!

— — — — — — — — — — — — — — — —

La dioj foriris.

Zeŭs restis sola en sia gloro ĝoja. Momenton li rigardis silente post la foriranta Apollo kaj ekmurmuris ne laŭte:

— Ho jes! Al li povas kontraŭstari virino malsaĝa.

Kaj tuj post tio, ĉar li ne estis elripozinta, li donis signon al la Dormo, kiu, sidante sur proksima arbo en figuro de falko, atendis la ordonojn de l'patro de la dioj kaj homoj.

Trad. A. Grabowski.

---

# La terura nokto.

El memoraĵoj de doktoro.

(Dediĉita al mia altirinto, s-ro N. Borovko.)

Tiam mi estis ankoraŭ juna doktoro, kiu nur komencis sian servan karieron. Mi servis en landaĵo kaj havis grandan rajonon. Iafoje okazadis al mi viziti iom malproksimajn vilaĝojn, kie mi ordinare ankaŭ pasigadis la nokton.

En ĉirkaŭ 28 km de la urbeto, en kiu mi loĝis, estis la vilaĝeto C*, kie ĉe unu germano loĝis la instruisto de tiu ĉi vilaĝo, juna homo havanta la aĝon de 23 jaroj, kiu suferis je malsano de koro (Insufficientia mitralis) kaj estis mia paciento. Unu fojon en nokto fariĝis al li tiel malbone, ke oni sendis venigi min. Estis malvarma vintra mateno, ĉiuj kampoj estis kovritaj de neĝo kaj blovis forta glaciiga vento. Sed mi kun mia ordinara rapideco englutis glason da teo kaj, sidiĝante en germanan glitveturilon, ekveturis. Komenciĝis forta neĝa blovado, la akra vento vipis niajn vizaĝojn, flokoj da neĝo gluis la okulojn . . . kelkajn fojojn ni perdis la vojon, kaj nur ĉirkaŭ la deka horo vespere ni alveturis en la vilaĝeton. La germano kun granda lanterno kaj malĝoja vizaĝo renkontis min en la korto . . . la malfeliĉa juna homo, ne atendinte min, mortis je la dua horo post tagmezo! Min frapis terure tia surprizo, kiel komencantan doktoron kaj kiel homon, kiu kore amis la mortinton. Kun multepeza sento mi eniris en la domon; en la salono sur la tablo kuŝis la mortinto. Kun granda atento mi rigardis la korpon kaj la lasta espero pri letargio perdiĝis: la okulaj pupiloj atestis pri tio kaj sur la korpo aperis makuloj de malvivo. Estus sensence reveni hejmen en tia nokto. La germano aminde proponis al mi pasigi la nokton ĉe li. Lia domo estis dividita en du partojn per la malgranda vestiblo:

unua, tiel nomata propra, kie estis la salono kaj apude malgranda ĉambreto de la instruisto, — la dua, malpropra, estis loĝejo de la mastro kaj la kuirejo. La germano enkondukis min en la ĉambron najbaran al la salono kaj deziris al mi bonan nokton. Sur la tableton apud la lito kun ordinara germana akurateco estis metita glaso da akvo, skatoleto da alumetoj kaj lampo. Malgraŭ la forta laciĝo post la malagrabla veturo, mi longe ne povis ekdormi, kredeble sub la impreso de la malagrabla sento, kiu estis elvokita de tiu ĉi morto. Mi nevole min kulpigis kaj malbenis la malbonan veteron: se ĝi ne estus, mi kredeble alveturus en ĝusta tempo kaj povus ankoraŭ doni helpon! Ekster tiuj ĉi pensoj la malbenitaj nervoj lasis sin senti. Estas strange, kiel premantan impreson faras homo mortinta! precipe en nokto, kiam vi scias, ke li kuŝas tie ĉi post la pordo . . . Se oni estas en tiu tempo en societo de homoj, la malagrabla, impreso forviŝiĝas, sed en soleco kun mortinto estas tre premante! Malgraŭ mia kvinjara laborado super malvivuloj en la anatomiejo, malgraŭ la konscio, ke tio ĉi estas malsaĝa kaj ridinda, precipe en doktoro (mi ekridus kredeble, rigardinte sur min de la flanko), mi sentis min tre malbone; la sovaĝa ploregо de la vento incitis ankoraŭ pli miajn nervojn. Por jam min distri, mi ekpalpadis sur breto kaj trovis ian lernolibron, ŝajnas geografian. Kun ĝojo mi malfermis la libron kaj komencis legi, — kredeble iam instruis el tiu ĉi libro la mortinta. Sed la legado min jam trankviligis kaj mi komencis senti dormeton; mi formetis la libron, entiris la meĉon de la lampo tiel, ke en mia ĉambro fariĝis mistera duonmallumo, kaj mi turnis min kun la vizaĝo al la muro, sekve kun la dorso al la malfeliĉa pordo. Jam mi komencis dormeti, kiam subite en la ĉambro najbara mi ekaŭdis brueton . . . en la komenco apenaŭ aŭdebla, poste pli klare, kvazaŭ ies singardemaj paŝoj alproksimiĝus ĉiam pli kaj pli al mia pordo . . . La dormo pasis momente, mi kun teruro malfermis la okulojn kaj ne povis min movi, tiom pli levi la meĉon! Kun dolora streĉado mi fariĝis tute orelo . . . subite mi aŭdas facilan frapeton en la pordon . . . malvarma ŝvito kovris mian frunton! Pasis ankoraŭ du senfinaj minutoj de dolora streĉado . . . la frapo ripetiĝis pli persiste!! Ne sciante mem, kion mi faras, mi litere eksaltis kaj sidiĝis sur la lito . . . malvarmaj fluoj de ŝvito ruliĝis sur mia vizaĝo, la haroj stariĝis supren — oni certe povus ilin kalkuli; sed la teruro tiel kunforĝis miajn membrojn, ke mi litere ne povis levi la manon por fari lumon. Mi ne povas priskribi, kiom mi trasentis en la kelkaj minutoj! oni diras, ke oni povas iafoje en kelkaj momentoj travivi kelkajn jarojn — tio ĉi sama estis kun mi; kiel mi ne griziĝis tiam, estas mirinde, eĉ nun, ĉe sola rememoro pri la tiama stato de mia spirito, fariĝas al mi premante. Fine, post la pordo, mi kun frapanta klareco ekaŭdis . . . m i a ŭ . . . Ho, diablo vin prenu! kvazaŭ varma akvo superverŝis min. Mi levis min rapide, levis la meĉon kaj kun bruo malfermis la pordon: granda kato de la germano staris kun la plej trankvila mieno kaj gratis mian pordon!!! Mi aliris al la malfeliĉa mortinto, deŝiris de li la kovrilon kaj longe staris apud la tablo, malbenante la malsaĝan katon kaj mian ridindan teruron.

La sekvantan tagon, apenaŭ fariĝis pli lume, mi petis doni al mi ĉevalojn kaj, nenion dirante al la bona germano, mi reveturis hejmen.

A. Ĉ-skaja.

# El la mondo.

Senpaga tero. En la mondo ekzistas lando, kien oni bezonas nur migri aŭ kie oni bezonas nur naskiĝi, por fariĝi terposedanto. Tiu ĉi lando estas: Nova Kaledonio. Ĉiu homo, enmigrinta en tiun ĉi landon, ricevas por prilaborado tri hektarojn da tero, ankaŭ tiom same ricevas ĉiu lia leĝe naskita infano; la gepatroj devas zorgi pri la prilaborado de la peco da tero de sia infano ĝis la plenjareco de la lasta. [El «Graĵdanin». V. Ŝmurlo.]

Aerostatoj. La New-Yorka gazeto «Electrical Review» rakontas, ke en Karmel, Illinois, estas fondita Societo por konstrui aerostatojn, kiuj povos levi preskaŭ 50 homojn kaj transporti ilin super la Atlantiko de New-York Londonon en 15 horoj. Tiuj ĉi novaj aerostatoj estos konstruitaj en formo de longa sferoido el pura aluminio, tute uzebla, pro sia malgranda pezo, por aerostatoj. Sferoido aluminia estos plenigata per hidrogeno aŭ per lumgaso; la platformo pendanta sub ĝi estos provizata kun direktiloj kaj ŝraŭboj, kies turniĝo donos al la tuta aera ŝipo la eblon sin movi antaŭen. La mova forto estos produktata per 4 gasmaŝinoj. La kajutoj por la veturantoj estos hejtataj kaj lumigataj per forto elektra. [El «Graĵdanin». V. Smurlo.]

La sekvantan komparon de l'homa vivo kun libro faras s-ro Ĉarls Fits Dĝefri: La homon oni povas kompari kun libro: lia naskiĝo estas la titolpaĝo, lia bapto — la dediĉo de l'aŭtoro; liaj krioj kaj ploroj — la antaŭparolo al la leganto; lia infaneco kaj juneco — la enkonduko kaj enhavo de la tuta sekvanta verko; lia vivo kaj agoj — la objekto mem de la verko; liaj krimoj kaj eraroj — la neviditaj malĝustaĵoj; lia pento — korektitaj preseraroj. Kelkaj homoj-libroj estas grandaj volumoj en folio, aliaj — malgrandaj en dekseseno; kelkaj estas bindataj per luksaj, aliaj per simplaj bindoj, kelkaj per multekosta veluro, aliaj per maldika papero; la objekto de kelkaj estas piaj kaj religiaj pensoj, de aliaj (kaj de plej multaj) — malsaĝaj kaj senmoralaj pensoj; sed sur la lasta paĝo de ĉiu libro staras la vorto «Fino», kaj tio ĉi estas la lasta vorto de ĉiu libro. Tia estas ankaŭ la homa vivo, jen ĝi estas pli, jen malpli daŭranta, jen pli, jen malpli forta, jen pli, jen malpli bona, sed la morto estas «Fino» de ĉio, ĉion finas ĝi, ĉiuj homoj finiĝas per ĝi. [A. Grünfeld.]

Ĥirurgiaj kapabloj de birdoj. En unu el la lastaj kunvenoj de la Geneva societo de naturistoj d-ro Fatio komunikis interesan raporton pri la kapablo de kelkaj birdoj kuraci siajn vundojn, fari ĥirurgiajn operaciojn, kaj bandaĝi siajn piedojn en okazo de ilia elartikiĝo aŭ rompiĝo. Fatio longan tempon okupadis sin je ĉasado en la norda Italujo kaj en aliaj landoj kaj ofte havis la okazon konvinkiĝi, ke kelkaj birdoj, precipe la skolopoj, havas la kapablon sanigi la vundojn kaj difektiĝojn de siaj membroj. Per helpo de sia beko kaj plumoj ili metas sur la vundojn plastrojn kaj en okazo de bezono faras eĉ ĉirkaŭligojn. Li unu fojon mortigis skolopon, kiu havis sur la brusto restaĵon de ligaĵo, kiu konsistis el malgrandaj plumoj, elŝiritaj el aliaj partoj de la korpo kaj kunbatitaj en plastron, kiu sin tenis sur la vundo per helpo de la sekiĝinta sango. Alian fojon li mortigis skolopon, kiu ĵus preparis al si tian saman plastron por meti ĝin sur vundon faritan per grajno de kugletaĵo. Sed la plej interesa estis la kaptita de d-ro Fatio ekzemplero kun rompita piedo. La saĝa birdo almetis al ĝi de du

flankoj du vergetojn, kovris ilin per tavolo da plumaĵo kaj ĉirkaŭligis la piedon per folio. La vergetoj kaj la plumaĵo firme alkuŝis al la tibio kaj tenis sin per helpo de ia glua ŝtofo.

Hipnozaj esploroj. La direktoro de la politeĥnika lernejo en Parizo, Rochat, faris antaŭ nelonge serion da tre interesaj hipnozaj eksperimentoj. Ili konsistis en tio, ke la impresebleco, kiu malaperas ĉe homo hipnotizita, povas esti transportata sur ian objekton, t. e. ke homo, ne sentante frapojn aŭ tuŝojn de sia korpo, sentas tre forte ĉiujn frapojn aŭ tuŝojn de la objekto, sur kiun estis transportita lia impresebleco. Rochat faris la sekvantan eksperimenton: li faris statueton el vakso, sur kiun li transfluigis la impreseblecon de unu juna virino metita en hipnozan dormon. La virino sentis la plej malgrandan tuŝon de la statueto, kaj la frapoj kaj pikoj de ĝi faris doloron al la hipnotizita. Eĉ post la vekiĝo la juna virino ne povis liberiĝi de tiu ĉi impresebleco, kvankam ŝi trovis sin en alia ĉambro kaj sekve ne sciis, kion oni faris kun la statueto. Tia sama eksperimento estis farita kun glaso da akvo, sur kiun estis transportita la impresebleco de tiu sama juna virino: kiam oni en la glason enmetis tranĉilon, la hipnotizita persono terure ekkriis kaj, kaptante per la manoj sian bruston, falis sur la plankon.

Tranĉado de vitro. Sinjoro A. Burnovski el Brest Litovsk komunikas al ni la sekvantan rimedon, kiun li uzas por tranĉi vitron laŭ kurbaj linioj, ekzemple por eltranĉi vitron por ovala kadreto: Oni devas profundigi la vitron en la akvon kaj tondi ĝin tiam per ordinara tondilo, ĝis la vitro akceptos la deziratan formon kaj grandecon. La vitro en tia situacio estas tondebla tre facile kaj ne rompiĝas; oni devas nur observi, ke la vitro kaj ankaŭ la tondilo estu tute en akvo, kaj ju pli profunde sub la akvo, des pli bone; en ĉia okazo super la vitro devas esti akvo ne malpli ol en la alteco de 1½ coloj.

Praktika nova maniero kuiri ovojn. Oni bezonas anstataŭ la horloĝo la termometron kaj observas sekvantajn normojn: Metu la ovojn en la akvon; kiam la termometro montras 50 gradojn R., tiam la ovoblanko komencas firmiĝi; kiam ĝi montras 70 gradojn, tiam la flavo estas ankoraŭ fluida; kiam ĝi montras 73 gradojn, tiam la ovoblanko estas perfekte firma kaj tiam la flavo komencas firmiĝi; kiam ĝi montras 75 gradojn, tiam la ovoj atingas la agrablan «prunmolecon»; kiam ĝi montras 76 gradojn, tiam la flavo estas ankaŭ firma; ĝia malmoleco pliiĝas nun pli kaj pli en bolanta akvo. Por niaj virinoj estus interesante provi tiun ĉi novan manieron. [G. Dumpert.)

Por gardi feron de rustiĝo. Profesoro Calbert trovis per provoj, ke fero aŭ ŝtalo konserviĝas multon da jaroj de rusto, se oni ĝin submetas en saturitan solvon de karb-acida kalio aŭ karb-acida natrio kaj ĝin sekigas. Objektoj el fero estas per tia maniero gardataj de rusto longan tempon. [G. Dumpert.]

Por forigi inkajn makulojn el tolaĵo facile kaj ne difektante la materialon, oni frotas ilin per verda sapo, verŝas sur ilin poste akvon kaj lasas la makulon elsekiĝi sur la suno, aŭ sur la herbo aŭ super telero sur suna fenestra tabulo; kelkajn fojojn oni ripetas la malsekigon kaj frotadon. Poste oni lavas la lokon en malvarma akvo kaj ankoraŭ kelkajn fojojn ripetas ĉion de la komenco. Ĉe brulanta suno la makulo post kelkaj horoj estas tute pli nevidebla.

# « Espero. »

En daŭro de presado de tiu ĉi numero ni ricevis kelkajn detalaĵojn pri la unua oficiala komuna kunveno de la societo «Espero», kaj ni presas ilin tie ĉi aldone:

Sinjoro J. Beker skribas al ni: «St. Peterburgo, la 6/18. Majo 1892. Estimata sinjoro doktoro! La malfermo de la societo «Espero» havis karakteron tre solenan. La gastoj havis antaŭ si feste aranĝitan salonon, en kies mezo sin trovis granda tablo, kovrita per drapo de verda koloro. Maldekstre de la eniro sur videbla loko pendas portreto de Lia Moŝto la nun reganta Imperiestro. La najbara ĉambro, difinita por biblioteko, estis plena de elmetitaj libroj, broŝuroj kaj gazetoj, ĉirkaŭ kiuj sin turnadis kaj movadis kun viva intereso la gastoj, dezirante videble konatiĝi kun la komenca literaturo kaj historio de la lingvo tutmonda. Kiam la nombro de la «niaj» kaj «fremdaj» (enkalkulante kelkajn fervorajn volapükistojn) atingis kvin dek, oni komencis la solenan preĝon, kiu finiĝis per varma parolo de la pastro Demetrio Bulgakovski, kiu esprimis la deziron fariĝi membro de nia societo, kiu, ne apartigita de la ceteraj rondetoj esperantistaj, faras kun ili tutmondan ligon. Post tio ĉi, laŭ unuvoĉa konsento de la fondintoj de la rondeto, la seĝo de prezidanto estis proponita al la konata akademiano Miĥail Osipoviĉ Mikjeŝin, kiu ankoraŭ en la tempo de priparolado de la projekto estis enkondukita en la Societon per la skribanto de tiu ĉi letero. Okupinte kun danko la honoran seĝon, sinjoro Mikjeŝin tre bele karakterizis la spiritan flankon de la lingvo Esperanto kaj en la fino de sia parolo proklamis Vin kiel la plej honoran efektivan membron, kies spirito loĝiĝis inter ni de la momento de ricevo de Via saluta telegramo, kio forte nin levis en la okuloj de la alestantaj reprezentantoj de la preso («Pravitelstvennij Vjestnik», «Novoje Vremja», «Novosti I», «Peterburgskij Listok», «Russkaja Jiznj» kaj «Sjevernoje Telegrafnoje Agentstvo»), el kiuj kelkaj tuj enskribiĝis en la nombron de kandidatoj de la aprobita de S-ro la Ministro de la Aferoj Internaj «ligo de rusaj esperantistoj», al kiu antaŭstaras granda estonteco. El la ricevitaj telegramoj la unua estis la Via (ankoraŭ antaŭ ĝia antaŭ lego, kio estis komisiita al mi, ĝi trakuris ĉiujn alestantojn, kiuj aŭskultis en tiu ĉi tempo nian Regularon); poste kelkaj lokaj kaj alilokaj telegramoj kaj post la fino de la oficiala parto de la kunveno — telegramo de s-ro Bogdanov el Sofia. Post la tralego de la Regularo havis lokon elekto de membroj de la Komitato. La elekto falis sur la sekvantajn personojn: Terentjev, Halle, Florell (iniciatoroj de la afero), Haller kaj mi. Prezidanto de la komitato — Kanaloŝŝy fon Lefler, kiu gvidis nin de la komenco kaj zorgis pri permeso por publika propagando. Ĉiuj disiris kun ĝojo en la vizaĝo kaj tiu ĉi tago kiun ni neniam forgesos, faris sur nin grandan impreson.»

---

La sekvantan tagon post la oficiala malfermiĝo de la «Espero» preskaŭ ĉiuj S. Peterburgaj gazetoj presis pri tio ĉi pli aŭ malpli grandan artikoleton. Multajn el tiuj ĉi gazetoj ni jam ricevis de la komitato de la «Espero» kaj de sinjoroj Burenkov kaj Smurlo. Ankoraŭ en tiu ĉi sama tago, post la finiĝo de la festo en la societo «Espero», la «Norda Telegrafa Agentaĵo» dissendis telegramon al diversaj rusaj gazetoj ekster-Peterburgaj (precipe al la Moskvaj gazetoj) kaj per tia maniero jam la 4/16-an de Majo multaj gazetoj (el kiuj multaj estis alsenditaj al ni) enhavis la sekvantan telegramon: «S. Peterburgo, 3 Majo. Hodiaŭ havis lokon, post solena preĝo, la malfermiĝo de la societo Espero por la disvastigado de la lingvo internacia Esperanto, ellaborita de doktoro Zamenhof en Varsovio. La Regularo de la societo estis aprobita la 24-an de Marto 1892. La ĉefaj fondintoj estas: la artisto Mikjeŝin kaj Lefler. Kiel prezidanto estis elektita Lefler.»

---

Al la festo de malfermiĝo la societo «Espero» ricevis de L. Zamenhof la sekvantan telegramon (en Esperanto); «Benitan komencon, kreskantan potencon en floro kaj gloro deziras el koro. Zamenhof.» La societo respondis al li per la sekvanta telegramo en Esperanto: «Espero korege dankas por telegramo kaj salutas ĝian unuan honoran efektivan membron elektitan hodiaŭ per aklamacio. Prezidanto de-Kanaloŝŝy-Lefler». — Sinjoro K. Hübert el Aleksandrovsk sendis al la «Espero» la sekvantan telegramon en Esperanto: «Dio donu al societo Espero sian benon por nia afero».

---

«Espero» alsendis al ni la sekvantajn kopiojn de la protokoloj de la I Komuna Kunveno kaj de la 1-a Kunsido de la Komitato:

## Kopio de la I-a Komuna Kunveno de «Espero», Societo Esperantista en S. Peterburgo,

efektiviĝinta en la propra loĝejo (Kuzneĉni, 15) la 3-an Majon 1892:

1. Post elaŭskulto de la Preĝo kun akvosanktigo kaj de la saluta parolo de l'plenuminto tiun ĉi Dioservon pastro Bulgakovski la alestintaj ok membroj-fondintoj

unuvoĉe elektis kiel prezidanton de la Komuna Kunveno la membron-fondinton Akademianon (de pentrado kaj skulptado) M. O. Mikeŝin.

2. La Kunveno estis komencita per mallonga parolado de la Prezidanto pri la signifo de la lingvo internacia, post kio estis tralegita de la membro-fondinto Terentiev la Regularo.

3. Kiel Prezidanto de la Societo unuvoĉe estis elektita la membro-fondinto s-ro de-Kanaloŝŝy-Lefler kaj kiel membroj de la Komitato per la plejmulto de voĉoj — la membroj-fondintoj s-roj Vilin-Beker, Florell, Terentiev, Halle kaj Haller.

4. La mezuro de la membra enporto estis difinita je 6 rubloj.

5. Kiel kandidatoj al membroj estis akceptitaj: s-roj J. A. Ĥarlamov, E. Julianoviĉ, A. B. Fletĉer, V. F. Ŝmurlo, M. C. Rozental; s-rinoj: E. K. Pokrovski, D. M. Miĥajlov, Nansi Halle; s-roj: barono G. G. Vrangel, A. G. Vasiljev, V. M. Brzozovski, P. R. Linkeviĉ, pastro D. G. Bulgakovski. Poste unuvoĉe estis elektita kiel honora-efektiva membro la aŭtoro de la lingvo Esperanto, D-ro L. M. Zamenhof.

6. En la tempo de la Kunsido estis tralegitaj la ricevitaj el diversaj regnoj kaj el aliaj urboj de Rusujo salutaj leteroj kaj telegramoj, post kio la Kunsido estis anoncita finita.

Prezidanto de la Komuna Kunveno:
Akademiano M. Mikeŝin.

Membroj-Fondintoj:
de-Kanaloŝŝy-Lefler, O. Beker, A. Florell, N. Halle,
V. Terentief, E. Haller.

## Kopia de l'Protokolo de la I-a Kunsido de la Komitato de l'Societo «Espero»
la 11. V. 92.

La 1-a Kunsido de la Komitato de l'Societe «Espero» estis la 11-an Majon 1892. Alestis: s-ro la prezidanto F. de-Kanaloŝŝy-Lefler, la membroj de la Komitato s-roj A. Florell, V. Terentief, N. Halle kaj E. Haller, kaj kiel gasto: s-ro Majnov. Antaŭ ĉio estis dismetitaj la oficoj: s-ro Terentief prenis sur sin la oficon de la kasisto, E. Haller — de la sekretario, N. Halle — de la bibliotekisto. S-ro Terentiev prezentis al la Komitato kalkulon pri staro de la kaso:

ĝis la 1-a Komuna Kunveno (3 Majo) estis:

| | |
|---|---|
| oferoj de la membroj fondintoj . . . . . . . . . . . . . | 50 rubloj |
| la gajno je la 7 kuponoj de la bonfara loterio, oferitaj de s-roj de Kanaloŝŝy-Lefler, Terentief, Florell, Halle, Haller, de-Wahl kaj Ŝmurlo*) . . . . . . . . . . . . . . . . . | 50 rubloj |
| la 3-an Majon s-ro Halle transdonis kiel membran enpagon de s-ro Zamenhof . . . . . . . . . . . . . . . . . | 10 rubloj |
| la 3-an Majon post la kunsido estis enportitaj membraj enpagoj | 31 rubloj |
| Post la 3-a Majo estis enskribitaj kiel kandidatoj: s-roj Pokrovskij, Nürnberg, Burjukof kaj de ili ricevitaj membraj enpagoj . . | 5 rubloj |
| | Ĉio 146 rubloj |

La Komitato decidis:

§ 1. Elskribadi por ĉiuj membroj de la Societo la gazeton «Esperantisto» kaj por ĝi permesi al la kasisto elspezadi monon el la membraj enportoj.

§ 2. Permesi al la kasisto elspezi 10 rublojn por malgrandaj kancelariaj materialoj.

§ 3. Por la oferita de kelkaj membroj mono meti en iaj gazetoj anoncojn pri nia afero.

§ 4. Organizi vendadon de libroj esperantistaj kaj por tio ĉi peti s-ron Zamenhof elsendi la necesan nombron de diversaj eldonoj.

§ 5. Esprimi dankon al la membro Halle por la oferita de li: portreto de Lia Imperiestra Moŝto Imperatoro Aleksandro III, meblo kaj kancelariaj materialoj.

§ 6. Esprimi sian koran dankon al ĉiuj personoj, kiuj alsendis al la Societo gratulajn telegramojn kaj leterojn.

§ 7. Ĉiuj leteroj, skribataj en la nomo de la Societo mem, devas esti subskribitaj de la prezidanto kaj sekretario. En la okazo de foresto de la prezidanto subskribas lia anstataŭulo s-ro A. Florell.

Prezidanto de la Societo: **J. de-Kanaloŝŝy-Lefler.**

Sekretario: **E. Haller.**

*) Ni estas petataj sciigi, ke la diritaj amikoj enportis en la kason de la societo ne 30% de la gajno, kiel estis dirite en No. 5 de nia gazeto, sed ili enportis la tutan gajnon.
La redakcio.

# Bagateloj.

Solvita problemo. Unu fojon la glora Buffon invitis al tagmanĝo kelkajn aliajn naturistojn. Post la tagmanĝo la societo deiris en la ĝardenon. Estis ankoraŭ sufiĉe varmege, malgraŭ ke la suno staris jam sufiĉe malalte. En la ĝardeno turnis sur sin la atenton staranta sur postamento vitra globo, kion oni ofte vidas en ĝardenoj. Iu, metinte sur ĝin la manon, trovis, ke per ia strangeco ĝi estas sur la ombra flanko multe pli varma, ol sur la suna. Li tuj komunikis sian eltrovon al sia najbaro. Unu post la alia ĉiuj komencis metadi la manojn sur la globon kaj trovis, ke la dirita estas vero. Ĉiuj kolektiĝis ĉirkaŭ la vitra globo, kaj komenciĝis alte scienca interparolo; ĉiu, por klarigi la fenomenon, elpensis sian teorion: unu supozis engluton de la radioj de varmeco, alia montris la liberiĝon de kaŝita varmelemento, tria klarigis ĉion per rebato de la radioj. Kion unu ne sciis, tion plenigis la alia, kaj fine, apogante sin sur leĝoj de la naturo, ili venis al la konkludo, ke la apero estas tute natura kaj ke alie ne povas esti. Buffon, kiu ne volis ankoraŭ esprimi sian opinion pri tiu ĉi apero, alvokis la ĝardeniston kaj demandis: «Nu, mia kara, diru, kial la globo sur la ombra flanko estas pli varma ol sur la flanko turnita al la suno?» — «Kial?» respondis la ĝardenisto, «tial, ĉar mi ĵus turnis la globon, por ke tiu ĝia flanko ne tro varmiĝu». [M. Solovjev.]

Unu virino plendis al kapitano, ke ŝi estas ĉirkaŭrabita de liaj soldatoj. «Ĉu ili ĉion forportis?» demandis la kapitano. «Ne, ili restigis ion» — «Nu, sekve tio ĉi ne estis miaj soldatoj; miaj prenas ĉion.»


Diferenco. Kia diferenco estas inter la unua amo kaj lasta? — Pri la unua amo oni ĉiam pensas, ke ĝi estas la lasta, kaj pri la lasta oni ĉiam estas konvinkita, ke ĝi estas nur la unua.

---

## Problemo 6 de ŝako

de C. May.

Nigro



Blanko komencas kaj donas maton per la 3a iro.

## Solvo

### de la problemo 4:

| Blanko: | Nigro: |
|---|---|
| 1. D. h 7 — g 8 | S. e 4 — e 3 |
| 2. D. g 8 — g 1 | kiel li volas |
| 3. D. donas maton. | |

aŭ:

| | |
|---|---|
| 1. . . . | R. d 4 — e 3 |
| 2. D. g 8 — g 2 | |
| 3. D. donas maton. | |

aŭ aliaj variacioj.

---

## Solvo

### de la ĉarado en N-o 5:

**mi - li - on - o.**

# Enigmo.

1
2 3 4
2 3 5 6 7
8 5 3 9 10 11 7
12 13 5 2 3 11 14 15 7
16 17 13 12 14 4 7
7 5 13 4 7
7 11 10
7

En la apude staranta figuro meti anstataŭ ĉiu cifero difinitan literon tiel, ke la meza vertikala linio donu la nomon de unu antikva urbo kaj la horizontalaj linioj donu la sekvantajn vortojn:

2. vorto havanta tre gravan signifon en la lingvo Esperanto;
3. tago de la semajno;
4. parenco;
5. regno;
6. grava objekto por virinoj;
7. membro de la korpo;
8. pronomo.

(Solvo en la sekvanta numero.)

# Respondoj al la amikoj.

*Al s-ro A. G.* «Bankierejo» oni povas diri.

*Al s-ro. J. L.* La formojn «anke, ankore, adie» k. c. oni povas ankaŭ jam nun uzi, se nia propono en N-ro. 4 estos akceptita. Laŭ nia propono estos «ank', ankor'» k. c., sed, ne enkondukante ion novan, ni ja povas kuraĝe uzi tiujn ĉi vortojn ankaŭ kiel adverbojn, sekve: «ank'e, ankor'e» k. c. Viaj aliaj proponoj estus eble ne malbonaj, sed nun ili estas neeblaj, ĉar en la nunaj cirkonstancoj ni povas al ni permesi nur tiajn novaĵojn, kiuj nenion rompas en la malnovaĵo.

*Al s-ro. N. S.* Pri la ne ricevita numero (kredeble perdiĝinta en la poŝto) volu Vin turni al la administracio de nia gazeto en Schalke.

*Al s-ro E. N.* Traduki la biblion, kiun ciu nacio havas en sia lingvo kaj per kiu, komparante kun la traduko en sia lingvo, ĉiu facile povus lerni la lingvon Esperanto, estus tre utile, sed . . . kie preni la rimedojn? Pro tiu kaŭzo ni ne povas eldoni Vian tradukon de Ruth.

# Novaj Esperantistoj. (Serio V.)

1656. Andersson, Elida, fraŭlino. Karlstad. Svedujo. [S. Lundström.]
1657. Bergh, A., studento. Upsala. Svedujo. [S. Lundström.]
1658. Bergström, K., stud. teol. Upsala. Svedujo. [S. Lundström.]
1659. Bloch, August. Leszno 4. Warszawa. Rusujo. [S. Goldberg.]
1660. Burnovski, A. Kirpiĉnaja 1996. Brest Litovsk. Rusujo.
1661. Castner, N. Malmö. Svedujo. [S. Lundström.]
1662. Chemla, Leon, advokato. Tunis. Afriko. [I. Ganouna.]
1663. Chemla, Nessim, ĉapelisto. Tunis. Afriko. [I. Ganouna.]
1664. Dumpert, G., komercisto. Königsstrasse 53. Nürnberg. Bavarujo.
1665. Feldŝar, Josef. Moskovskaja ulica No. 29. kv. 7. Nikolajev, gub. Ĥerson. Rusujo. [H. Najmanowicz.]
1666. Fredlund, Erik, pastro. Järlasa. Aland. Svedujo. [S. Lundström.]
1667. Frolov, N. I. Bolŝaja ulica, magazin Frolova. Simbirsk. Rusujo.
1668. Hallander, Evald, fil. stud. Vg. Odensgatan 11. Upsala. Svedujo.
1669. Hök, Calla, fraŭlino. Upsala. Svedujo. [S. Lundström.]
1670. Hök, Clara, fraŭlino. Upsala. Svedujo. [S. Lundström.]
1671. Huttman, Joh. Malmö. Svedujo. [S. Lundström.]
1672. Johansson, Pontus. Linköping. Svedujo. [S. Lundström.]
1673. Koralka, Heinrich. Apotheker, mag. pharm. Olmütz. Aŭstrujo.
1674. Kratochwil, Edmund, Dr. med. Olmütz. Aŭstrujo.
1675. Ljungberg, C. Nyköping. Svedujo. [S. Lundström.]
1676. Lumbroso, Giuseppe, komercisto. Beja. Tunisujo. Afriko. [I. Ganouna.]
1677. Martakova, Anna, s-rino. Monastirskaja Naberejnaja No. 33. Obojan, gub. Kursk. Rusujo. [A. Martakov.]
1678. Martinovski, E. ugol Karavannoj i Italianskoj, d. 14/16, kv. 18. S. Peterburg. Rusujo.
1679. Messaond, Maarek, gazetisto. Tunis. Afriko. [I. Ganouna].
1680. Miĥailov, A. Bolŝaja ulica, magazin Frolova. Simbirsk. Rusujo.
1681. Norén, Ester. Alingsas. Svedujo. [S. Lundström.]

1682. Oĵegovski, M. S. Duĥovnaja Seminaria. Kiev. Rusujo.
1683. Olsén, Gunnar, stud. fil. Kalmagergaden, 10. Kristiania. Norvegujo. [S. Lundström.]
1684. Ouchterlony, Helfrid, fraŭlino. Göteborg. Svedujo. [S. Lundström.]
1685. Rang, J. E., stud. fil. Upsala. Svedujo. [S. Lundström.]
1686. Rendahl, C., studento. Upsala. Svedujo. [S. Lundström.]
1687. Scapiniz, José. Cortina del Muelle. Malaga. Hispanujo.
1688. Simoningsköld, Beda. Stockholm. Svedujo. [S. Lundström.]
1689. Staaf, K., studento. Drottninggat. 1. Upsala. Svedujo. [S. Lundström.]
1690. Svanbom, K. O., teol. stud. Upsala. Svedujo. [S. Lundström.]
1691. Tejada, Vicente. Calle Olerias No. 41. Málaga. Hispanujo.
1692. Tidestrand, Lydia, instruistino. Arboga. Svedujo. [S. Lundström.]
1693. Tobiana, Ephraim, komercisto. Tunis. Afriko. [I. Ganouna.]
1694. Wallberg, C. H. Börrum. Svedujo. [S. Lundström.]
1695. Vulf, A. A.
1696. Vulf, L. A. } Ĥarlampievskaja 91. Kiŝinev. Rusujo. [A. Grünfeld.]

# Anoncoj.


## Nurnbergan Gazeton

por

**Industri' kaj Komerco**

(Nürnberger Zeitung für Gewerbe u. Handel)

ni rekomendas por abonado kaj anoncado. Kosto por 1/4 de jaro 1.50 *M.*

Kunlaborantoj de la gazeto estas la plej bonaj komercistoj de Nurnberg.

Ekspedicio: Pfannenshmiedgasse 25, **NÜRNBERG.**

Bei kämmerer in halle a. d. f. erŝien:

**«Die Schrecken der deutschen Sprache.»**

Vorschläge zur Vereinfachung des deutschen, fon j. f. mählifs, 23 feiten, 50 pf.

## La presejo de W. Tümmel

**en Nürnberg,**

de kiu tiu ĉi gazeto estas presata, rekomendas sin por

**Ĉiuj presaj laboroj.**

**100** diversajn, uzitajn poŝtsignojn de Azio, Ameriko, Afriko kaj Aŭstralio sendos por 3 frankoj

**Adolf König,**
Schalke (Westfalen), Germanujo.

## KORESPONDAS

**Vladimir Vladimiroviĉ de Majnov**

**(Adreso: S. Petersburg, Bureau des Postes, poste restante),**

pri demandoj religiaj kun personoj pagantaj respondon.

Oni volu sendi

**l'adresojn de la libristoj**

vendantaj eldonojn en **Esperanto.**

**S. Peterburgo,** Rio Fontana 110.

**V. Shmurlo.**

La libretojn **42, 43, 52, 53** dissendas por poŝtsignoj

**W. H. Trompeter, Schalke,**
Westfalen, Germanujo.

## La plej necesa verko

**por ĉiu,**

**kiu volas ekkoni la lingvon Esperanto:**

No. 11. **„Dua libro de l'lingvo internacia“** (sistemaj ekzercoj). 50 paĝoj. Kosto 65 centimoj (= 25 kopekoj).

Ĉiujn verkojn pri aŭ en la lingvo Esperanto (de kiu aŭ eldonitajn) elsendas **L. Zamenhof** (Varsovio, str. Nowolipki No. 21). **La nomaron kaj kostaron** de la tuta literaturo Esperanta oni trovas en la libro No. 41. Kiu aĉetas por pli granda sumo, povas ricevi grandan rabaton.


Für die Redaktion verantwortlich: Chr. Schmidt, Nürnberg.
Druck von W. Tümmel's Buch- und Kunstdruckerei in Nürnberg.